

Ĉineske

(IX)

e-Librigita de Elerno

jul. 2009

Busuanzi (Aŭguristo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de
55,75 silaboj kun duona rimo.

Cindy Mckee (Usono)

Via Amludo

**Vian amludon
mi volas ludi
He! Skuu min ekscite
volas min trudi**

**en sonĝoj viaj
kiel malprudi?
Do! pri tiu problemo
mi iras studi**

Eto

Kandelo

**kun maldika korp’
per flagranta flam’
kandel’ senegoista
brulas per vakslarm’**

**brilon ĝi al ni
donas ĝis viv-lam'
sin dediĉas ofere
per sentplena am'**

Frida Larmoflu'

**El via okul'
frida larmoflu'
gutadis neretene
kun ekscita sku'.**

**Vi eble perdis
ludon de amĝu'
aŭ maltrafis amaton
en la sonĝo, ĉu?**

Sam

Julia Nokto

**brillumas luno
en nokt' julia
ni kolektiĝas ronde
dum temp' feria**

la nokt' pejzaĝo
ja poezia
fascinas ĉeestantojn
kun sent' ebria

Zhuang Qixiong

Financa Krizo

Bazar' ondegas
de komerca kriz'.
Kiom la plago pasos
en mondparadiz'?

Ĉiuj langvolas
kiel paraliz'.
Ĉu mizera viv' venas
nur kun improviz'?

Caisangzi

(Moruskolektanta Knabino)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de
74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa, a,a. (x=senrima)

Eto

Aŭtuno Frida

amo kvazaŭ en aŭtun'

restas frida

kaj timida

kelktempe eĉ insida

mi atendas tede kun

kor' avida

kaj trepida

kelktempe eĉ senbrida

Mia Pudelo

al mi plaĉas la vivaĵ'—

mia pudel'

**kun blankmantel'
longa pendanta orel'**

**ĝi sin amuzas distrige
per pilka pel'
luda ribel'
kaj sinkaŝiĝ' sub ombrel'**

Korinklino al Kamparo

**la memoron mi fosas
pri kamparo
kun la maro
de verda gren-plantaro**

**plaĉas al mi ekstaze
akva klaro
porda knaro
kaj homplena bazaro**

Chaitoufeng

(Feniksa Harpinglo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po ok versoj de 3,3,7;
3,3, 44, 1, 1*, 1* silaboj, kun rimaranĝo de aaa, bbxbBB
kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.

Cindy Mckee (Usono)

Ĝis, ĝis, Mikrosofto!

**Libero
sur tero
mikrosofta vespero—
rezignu
kaj signu
adiaŭon!
Ni asignu
Gnu
Gnu
Gnu!**

**Prospero,
kohero,
ankoraŭ en utero
Disĉiplu
kaj kuplu
komputilon**

**Ĝin ni staplu
plu
plu
plu!**

Paĝo ĉe la projekto Gnu:

<http://www.gnu.org/philosophy/free-sw.eo.html>

Yanke

Trompita Amo

**kelkjara
erara
am' nin tenas senpara
kun glaci'
sen ĝojkri'
vi min trompis
je fojoj tri
vi, vi, vi**

**amara
senflara
mi strebas al vi kara
kun pasi'
kun ebri'
mi tre stultas
sen ajn konsci'
mi, mi, mi**

Changxiangsi

(Longa Sopiĉo)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po kvar versoj de 3, 3,
7, 5 silaboj kun kontinua rimo.

Sero

Homa Stel'

**estas stel'
kun tremhel'
ĉiu homo sur la ter'
laŭ la viva rel'**

**se l' juvel'
falas el
la nigra nokta ĉiel'
finas homfabel'**

Chaozhongcuo

(Pedanta Klerulo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj
respektive de 7,5,66 / 444,66 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa
/ xxa,xa (x=senrima).

Cindy Mckee (Usono)

Dankon!

**sekfluis puna vundo
sekco en grundo
mi estis dezerto
Okazis inundo**

**pluvo nutris
min kurace
amabundo
via vivigis min
Dankon pro fekundo**

Eto

Senpluva Eter'

**ne vapore en aer'
senpluva eter'**

**daŭras longe longe
ĉu ĉiela koler'?**

**ve, suferas
vilaĝanoj
sur seka ter'
kun velkaj plantaĵoj
preĝante per ofer'**

Niuniu

Sopire al Hejmloko

**min tiklas la sopiro
al hejmeniro
ne vizaĝesprimo
sed kun kora ŝiro**

**tagenokte
ja pliiĝas
la deziro
mi eĉ en la sonĝo
krias kun deliro**

Daolianzi

(Kanto de Lavantino)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ
rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Fero

**al mia
mondsfero
minacas timafero
juna stelo lumiĝas
tra hejma atmosfero**

**forĝfajro
de fero
en via fotosfero
fulmegas trans vakuo
sen franĝa interfero**

Yanke

Insulo

**insulo
en maro**

**solece sen najbaro
kuŝas dum milmil jaroj
kaj sopiras al paro**

**alflugas
la mevo
konsolas lin per revo
ĉu realiĝ' sopira
aŭ denova sonĝkrevo**

Dianjiangchun

(Ruĝigitaj Lipoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj
respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj, laŭ rimaranĝo
xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)

Niuniu

Miela Buŝo

**el miela
buŝo venas belsona
laŭbezona
parol' bontona**

**ne ĝin kedu—
jen vort' admona
ĝi ŝajnas
vip' demona
katen' aldona**

Dielianhua

(Papilio Super Floroj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de
7,45,7,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,a (x=senrima)

Niuniu

Vanta Papili'

**ŝvebas flirte papili'
super floroj
en suna juni'
por pavi kun zuma kri'
antaŭ l' insekta soci'**

**jen per sia energi'
ŝi rondflugas
ŝajne pro ebri'
fale sen mema konsci'
ĉu ŝi en blinda pasi'?**

Dingfengbo

(Subigo de Ŝtormo)

Ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj
respektive de 7,7;7,2;7;/ 7,2;7,2;7; silaboj, laŭ rimarĝo
aabba/ccdeed

Cindy Mckee (Usono)

Kiu viktimo?

**vi venas sen pasporto
nevivpova aborto
de patrujo forvelka
kelka
Nenombrita eksporto**

**ĉi tie nur ĝenkventa
vanta
kiel subŝua cimo
amaso da malhomo
Nomo-
alia krom viktimo**

附英文译文:

What Victim?

--in the tradition of Ci, form Dingfengbo

You come without a passport
nonviable, so abort
from motherland long since flagged
Untagged
uncalculated export

Here, only a vexing sum
irksome
a bug on our shoe-bottom
nonhuman brute crowd that came
your name -
anything besides victim

Fendieer (Papilio)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj po 8 versoj de
10,34,334,36 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xxa,xa
(x=senrima)

Lily

Papilia Amo

**en memoro mia intimis ni
ankoraŭ
kisa seri'
lupeska
volupta
amor-pasi'
diboĉa
lita amlud' mani'**

**sed nun papilie vanuis ĉi'
mi dronas
en agoni'
triste
mizere
en fantazi'
pri nia
neebla komedi'**

Fengrusong

(Vento Inter Pinoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj
respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ
rimaranĝo a,a,xxa,xa /a,a,xa,xx (x=senrima)

Eto

Mi Perdiĝas

**mi perdiĝas antaŭ l' am'
de ŝia korflam'
neste en ŝia brakum'
mi kredas
pri la gam'
de ŝiaj amsentoj
per sincera proklam'**

**mi perdiĝas je l' cunam'
de miks-sentoj jam
en kirl' de am-rivero
mi ja dubas pri la dram'
de larmoj kaj kisoj
sub la farsa piĝam'**

Zhuang Qixiong

Neĝero

**Kiel blanka papili’
mi kun emoci’
ĉie flirtas senĉese,
nepre ne
pentas pro di’
korera kaj falas
trans ĉiela geni’.**

**Mi gefratojn en magi’
invitas kun pi’,
por semi arĝent-brilon.
Vivante,por ornami;
mortinte,por printemp’
de ter’ al harmoni’!**

Guizhixiang

(Aroma Laŭrbranĉo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 4, 54,
64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo
a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xxa (x=senrima)

Vejdo

Amo de Patrino

**patrina am’
kiel lanterno
kun brila flam’
prilumas la vojon
de makadam’
por mi plena je dornoj
via am’
sen ajn ornam’
varme fluas
en mi de jun’
ĝis nune jam**

**kiam mi en dolor-gam’
triste troviĝas
kiel balzam’
via am’ min tuŝas
en viva dram’**

**vi ludas gravan rolon
kun fervor'
jen per akklam'
mi salutas
vin eterne
sen ajn malsam'**

Haoshijin

(Proksimiĝas Bona Afero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 56,65 /
75,65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x = senrima)

Vejdo

Infanoj en Mizer’

okaze de Infana Festo

**ĉe sia festo
infanoj en mizer’
treniĝas malsate
sur arida ter’**

**ne forgesu pri ili
pri reala ver’
ni kaj la gefiloj
vivas en buter’**

Hexinlang

(Gratulo al Novedzo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj
respektive de 5,344,76,7,78,33 / 7,344,76,34,78,33
silaboj, laŭ rimaranĝo a,xxa,xa,a,xa,xa / a, xxa, xa, xa,
xa,xa (x=senrima)

Lily

Edzo Perfidis

**mi trovis fine
ke mia
edzo kuŝas
ja fascine
sur la ventro de l' ino
vestita bikine
ŝin kisadas kapkline
kompreneble lia bird'
restas en ŝi kvazaŭ pine
piŝtadas
obstine**

**svene turniĝis ŝpine
mia kap'
ĉu mi estas
jen putine**

**traktata kiel edzin’?
ĉu li laŭdestine
posedas
ja domine
la rajton malfideli?
mi karesas lin ensine
vane kor-
inkline**

Heyebei (Lotusfolia Taso)

ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 6,2:3;7,2;3 silaboj,
laŭ rimarango aab,ccb

Mandio

Akvolilio

jen sur akvolili'
magi'
de sunbril'
ĵongladas per rosaj rul'
kaj lul'
kun facil'

Liĉio

liĉio matura
pura
sukplena
invitas al mangofest'
ĉeest'
senĝena

Huanxisha

(Silk-lava Rojo)

ĉina fiksforna poemo el du strofoj po tri versoj de sep silaboj laŭ rimarango aaa / xaa (x=senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Hundo sur ĉeno

**Vi palpas ĝin viscere
vualas vin ekstere
Li vundus vin severe**

**se penso eĉ emanus.
Estiĝas efemere
memeco. Pasis, vere.**

Eto

Kvieta Rojo

**ĉe klara roj' kvieta
flosas boato eta
preter fiŝar' elĵeta

jen aŭdiĝas kantado**

per la voĉo falseta
de knabino koketa

Mandio

Spektado al Suneklipso

plene taglumas jam nun
ekvanuas part' de l' sun'
pro kovrado de la lun'

mallum' tuj pendas base
vualiĝas ĉi' en brun'
ĉu malfeliĉ' aŭ fortun'?

Jiangnanchun

(Printempo Sude de Rivero)

ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Helena Tylipska (Italujo)

Post Ŝtormo

Ĉe l' kverko
centjara
karesas dorson
la vent' elmara.
La eta pluv' trankvilas,
ripozas greg' ŝafara.

Matena roso

L' obskuro
jam foras
Floran tapiŝon
la sun' koloras
Nokto perlojn disĵetis
cent floroj freŝe gloras

Fablo

**La rano
kun lepor'
diskutis vige
pri grava labor'
Fine ĝi plongis lagen
kaj leporo fuĝis for.**

La Vivo

**Ni spertis
hieraŭon
Ni iel vivas
nun hodiaŭon
Ĉu ni vidos serenan
de la nepoj morgaŭon?**

Sero

Vintro en Sudo

**en sudo
hurlas vent'
pike malvarma
super domtegment'**

**la frida pluv' vizitas
vastan teron per frekvent'**

**ankoraŭ
sen lament'
la verda mondo
kun kora kontent'
kovas vivon interne
dum longa frosta ferment'**

Jianzi Mulanhua

(Mallongigita Melodio

Magnolia)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.

Cindy Mckee (Usono)

La temo estas limonado

**porda puŝo
tiam tenera tuŝo
buŝa suĉo
ĉerpo el suka kruĉo**

**lekas lango
globajn gutojn de vango
gluta glito
likva kisoekscito**

Eto

Magnolio

**magnolio
belas en sunradio**

**blanka floro
kiel tutpura koro**

**kiu scias
ke ne ambicias
ĝi per belo
strebi por flor-nobelo**

Niuniu

Nokta Zefiro

**nokta zefir'
inspirigas pri sopir'
al lontana
plumamiko japana**

**en malproksim'
mi deziras kun estim'
sanon al li
laborema kun pasi'**

Kuxiangsi

(Profunda Sopro)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj po 8 versoj de
7,33,45,733 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa (x =
senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Impulso de Dio

**Eksplodiga preludo
tamburis / novludo
La tempo estas aludo
al dia / inkludo
de nia / konkludo**

**Universa etudo
Finala / apudo
Postsone forfadas studo
Okazos / eksudo
Karbona / vivkrudo**

附英文译文：

In an explosive prelude
drumbeat a new pursuit
The concept of time does allude
to god's choice to include
a law that we conclude.

This universal etude-
finale soon is cued
away fades first impulse ended
and we will then exude
our carbon core life-crude

Niuniu

Mi Estas Radiko

**sub profunda ter-diko
vivas mi
radiko
malsupren per forta piko
kun korpa
fortiko
sen ajna
paniko**

**for de suna liriko
de homa
ciniko
mi ĝuas en grundpikniko
kunul' 'stas
lumbriko
mallum' 'stas
amiko**

Langtaosha

(Ondo Lavas Sablojn)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de
5,4,7,74 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa (x=senrima)

Eto

Marstelo

**la bruna marstel'
sub onda pel'
flosis libere sen cel'
mi remis por ĝin kapti
per la sitel'**

**nun en mia ĉel'
plena je hel'
ĝi kuŝas jam sen ribel'
kvankam sekiĝinta, ĝi
logas kun bel'**

Litingyan

(Hirundo ĉe Kiosko)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 66, 76,
56 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Niuniu

Pasintaj Jaroj

kiel herboj sub neĝ’
velkiĝis en memor’
miaj pasintaj jaroj
malviglaj sen brilglor’
jen malaperis
malproksimen jam for

nur stri’ da paseo
persistas sen ignor’
resti nedisigeble
funde de mia kor’—
l’ amafer’ kun ŝi
kostas je altvalor’

Linjiangxian (Feo ĉe Rivero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de
66,7,55 laŭ rimarangô xa,a,xa (x=senrima)

Eto

Ĉielarko ĉe Ponto

**Post subita pluvo
ĉielo serena
venas kun freŝ' festena
homoj eliras
kun kor' senĝena**

**la arka rubando
riĉkoloras plena
je variado scena
ĉu ĝi kondukas
al ter' edena?**

Guozhu

Ĉinesko Linjiangxian

**Mi ricevis ganton--
defia elsendo.
Kant' pri sun' en descendo.
Ŝancoj malmultas.**

Cindy, falendo!

**Mi estas azeno
de obstina gento
por patenta pretendo.
Sed al mi bato,
ŝi as por vendo!**

Versis Cindy McKee. Esperantigis Guozhu

Noto:

Kun granda ĝojo mi legis en la suba ret-adreso la novan poemon de usona esp-istino, s-ino Cindy McKee.

Mi opinias tion "Poemo negranda, sed signifo granda". Ĉar ĝi estas la unua ĉinesko versita en la angla lingvo. La aŭtoro, nia kara Cindy McKee, unue kontaktis kun ĉinesko en Esperanto. Ŝi ekŝatis, kaj mem versis, post versado de pli kaj pli multe da ĉineskoj, nun ŝi kondukis ĉineskon en la anglan lingvon. Tiu ĉi nova poemo markas la eniron de ĉinesko en la alian novan lingvon, nature kun mejloŝtona signifo. Guozhu prove faris esperantigon kaj ĉinigon por ĝi. En la samforma traduko mi ofte sentas ke la transdono de versa mezuro (silaboj) estas tre malfacila. Kaj ekmemoras alian faman diron: Traduko estas perfido.

非常高兴在下面的地址读到美国世界语者Cindy

McKee的新作：英语中国风。

国柱以为这首小诗有大意义。这是我见过的第一首用英语写成的中国风，而作者首先是接触到用世界语写成的中国风，感到喜欢，自己写了许多首之后，诗兴大发，进而用英语写成了这样一首新作。标志着中国风进入到另外一种语言，具有里程碑的意义。国柱试着作了世界语和汉语的翻译。感到在音节数目的控制方面，难度很大。不由得想起了另外一句名言：翻译即背叛。

<http://www.elerno.cn/bbs/dispbbs.asp?boardID=24&ID=9265&page=1>
angla ĉinesko

Kara Vejdo,
Mi rapide skribis anglan Linjian-xian. Estas tiel amuze,
ke mi tuj volas sendi al vi:

I received a challenge!
Yessir, says the sender
Girl, your chances are slender
chant your sundown song
Cindy, surrender

I'm an obstinate ass
could be a contender
for most patent pretender
But, she set me straight
Pain? She's the vendor!
:)

Humure, Cindio

--

Cindy McKee

Cindio

Skribas Vejdo 2009-7-7 12:07:34

fakte, angla lingvo estas pli taŭga ol esperanto en verkado de ĉinesko, ĉar en angla lingvo troviĝas pli multe da unusilabaj vortoj ol en esperanto. malfeliĉe neniuj enkondukis ĉineskon en anglan lingvon. cindy donis bonegan ekzemplon!

临江仙·戏作英语中国风

接到一封挑战，
来者话语猖狂：
姑娘，唱歌叹夕阳，
机会不多矣，
秦娣快投降！

我偏要来竞争，
傻瓜生性倔强。
岂料求胜成妄想，
直接遭痛击，
难敌街女郎！

秦娣 Cindio 原作 国柱汉译

Manjiangong

(Rivero Plenruĝa)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de
434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ
rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x =
senrima)

Vejdo

De Nova Start'

Omaĝe al 30-jariĝo de HEA

**tridekjaraj
zorgemaj
flego kaj vart'
varmigas
E-movadon
en fajra ard'
solidara HEA
en la ĉina centra part'
progresas
pene antaŭen
per transsalt'

sub verda
la standard'**

**bezonas
kun vol-hard'
ni ja klopodi
al plia alt'
per solida sinergi'
laboru forte sen halt'
gefratoj
strebu kune de
nova start'**

附中译文：

从头越

贺湖北世协30周年华诞

—调寄满江红

三十年间，

有多少，

殚精虑竭。

呵护我，

珍爱世运，

火样炽热。

中部崛起在华夏，

优秀团队鄂世协。

齐努力，

大步向前迈，

足登捷。

绿星旗，

展队列；

英雄志，

坚如铁。
勇攀更高峰，
豪气千叠。
精力充沛斗志昂，
干劲十足不停歇。
同志们，
长征新起点，
从头越。
（国柱汉译）

Nangezi (Suda Kanto)

ĉina fiksforma poemo el 4 versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

Mandio

Venĝema Dorno

**enpota kaktio
en vintro frida
velkis pro gel' senbrida
ĝis forpereo malrapida**

**kun klinita kap'
ĝi iĝis pala
kun junverd-haŭto fala
krispis la korp' faden-spirala**

**mi volis tiri
ĝin for permane
ĝi min pikis tirane
per la dornoj, mi penis vane**

**venĝema post mort'
ĝi ankaŭ restas
se ia fort' infestas
per rigidaj dornoj rezistas**

Niannujiao

(Ĉarma Kantistino)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 436,
436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimarangô xxa,
xxa,xxa,xa (x = senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Infano en Mizero

**ena kanto
de knabo
stumblas dum malsato
disonanco
missonas
tra interrilito
ke ni sentu
alĝusdtigu
ĝis akordstato
panon donu
pro vera kompatio**

**ni dampos vibradon
donos kvieton per
paŭzfermato
ĉiu el ni
private**

sen helpo de ŝtato
pli efike
adaĝon kreos
sur la strato
lantkadence
sed, sen ekspluato

Guozhu

Omaĝe al la Centjara Jubileo de la ĉina Esperanto-movado (1909-2009)

En la jaro/ dumil naŭ,/ jubileo kara:
E-movado/ la ĉina/ fariĝis centjara.
Ĉiam luktas/ malgraŭ ĉia/ obstaklo bara
pioniroj / kun kreiv' elstara.

Verda Stelo brilas/ gvide ankoraŭ/ pli
muara.

Maratono,/ stafeto, /merito elfara.
Brava krio: /Ĉinoj (re-)venas!/ Ĵur'
deklara:
Ni re-marŝos/ en lig' solidara!//

汉语对照:

百字令

— 纪念中国世运百年

二零零九，喜迎来，接二连三佳节。
中国世运，历百年，写就光辉史页。
风云变幻，绿星璀璨，奋斗不停歇。
筚路蓝缕，前辈艰苦卓绝。

最显铮铮铁骨，疾风知劲草，战乱浩劫。
前仆后继，马拉松，世运火炬力接。
引吭高呼：中国人来了！豪气千叠。
大国崛起，雄关待从头越！

--- **Guozhu (Miĉino)** 2009-05-16
en la 14-a Hubei-a Esperanto-Seminario

Pozhenzi

(Kavalira Danco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de
66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x = senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Neda*

**Persio regata
de menso obseda
Kantas antikvaj voĉoj
pri kulturo hereda—
aldonu Neda**

**Spirita gvidanto
spirito poseda
Kantas juna spirito
leviĝas voĉo pleda
memoru Neda**

**Neda estis junulino kiu partoprenis en paca manifestacio kontraŭ la forpreno de voĉdonrajto en Irano. Kuglo de kaŝpafinto forprenis la vivon de Neda. Ŝia nomo signifas voĉo en la persa (farsi) lingvo.*

Yanke

Hejmsopiro

mallumo min lulas
per forta hejmsopir'
l' animo vagas foren
al betularba spalir'
kaj kampa zefir'

al gepatroj karaj
kun larmlena suspir'
al knabaj akompanoj
al petolema konspir'
al juna dezir'

Pusaman

(Budhista Dancisto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 7,7;5,5;
/ 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

Mao Zedong

La Turo de Flava Gruo

**Tra l' ter' naŭ fluoj vagas,
fervoj' nord-suda svagas.**

**Du montoj en pluv'
premas sur diluv'.**

Kien Flava Gru'?

For de tur-situ'.

**Ofer-verŝas vin',
penso tajdas pli.**

esperantigita de **Vejdo**

Qinyuanchun (Printempo en la Ĝardeno Qin)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 13 versoj de
444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ
rimaranĝo xxa,xxxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxxa,xxa,xxa (x =
senrima)

Lily

Ne Printempas Ĉi Tie

**ne printempas
jam ĉi tie
sen halucin'
li ja foriris
malproksimen
senkompate
forlasis min
en soleco
kiel hundon
mi trenas min kun obstin'
sur viv-vojo
firme kaj brave
kontraŭ l' destin'**

**ĉu li ja montras sin
malema**

**ludi kun kapklin'
inter du gamboj
supraj miaj?
eble li nun
sur arda in'
kuŝas ventre
kun sia stang'
ene de ŝia vagin'
ve al mi—
lia uzita
povra putin'**

Qingpingyue

(Serena Muziko)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,5,7,7
/ 6,6,66 silaboj, laŭ rimarangô a,a,a,a / a,a,xa (x =
senrima)

Niuniu

Bela Ari'

**bela ari'
jen kun poezi'
sonas en la famili'—
nia viv' en harmoni'**

**malantaŭ la pordo
kaŭras bona sorto
ĉiuj anoj sentas
sin en viv-komforto**

Queqiaoxian

(Feino sur Piga Ponto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 446,
734 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xxa (x=senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Ekzisto pro bezono

**Ĉu ekzistas
senarbitra
vero absoluta-
aksiomo de ĉio
solida
senrefuta?**

**Ĉu bezono
havi bazon
estas atributa
vero de kerna vero-
esenco
neimputa?**

Yanke

Irinte kun Vent'

jam nenio
iom restas
ĉio iris kun vent'
for senrevene vere
juneco
kun arda sent'

malaperis
el tuta korp'
jen kvazaŭ dum moment'
eĉ mia hom' seniĝas
tute el
ĉies atent'

Renyueyuan (Rondiĝo de Luno kaj Homoj)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj de 5 kaj 6 versoj
respektive de 75,444 / 444,444 silaboj, laŭ rimarangô
xa,xxa / xxa,xxa (x=senrima)

Mandio

Plenluno

**alte pendas en ĉiel'
brila plenluno
kvazaŭ ridus
al vaganto
en verdjuno**

**li priploras
la disiĝon
ĉe aŭtuno
de l' patrino
kaj sopiras
al rekuno**

Rumengling (Kvazaŭsonge)

ĉina fiksforma poemo el 7 versoj de 6,6,56,2,2,6 silaboj,
laŭ rimarangô a,a,xa,a,a,a. La kvina kaj sesa versoj estas
samaj.

Zhuang Qixiong

Sezona Ritmo

Printempo

**Ebria ter' en briz';
ĉiuj kun verda ĉiz'.
Ĝi bonodoras
ja kiel paradiz'.
Senz' ,
senz' ,
ĉu, hirunda amviz'?**

Somero

**Nenio en labor'
ĉe fajrosuna hor'.
Abrupte fulmas,
tondras kun nuba plor'.
Trezor',
trezor' ----
postpluva bonhumor'!**

Aŭtuno

**Gaje pepas paser’;
grenejoj tra la ter’.
Abunda frukto!
Ĉu beno de ĉiel’?
Liber’,
liber,
por maten’ kaj vesper’.**

Vintro

**Neĝas en jar’ korta
kun vent’ ne komforta.
Nur pino antaŭ mont’,
kiel ferost’ sorta.
Forta,
forta,
heroo ne morta!**

Shaonianyou

(Vojaĝo en Juneco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de
7,5,445 /75,445 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa / xa,xxa
(x= senrima)

Ardo

Omaĝe al legantoj de Tra la mondo

**tra la mondo
brulas fajro
de verda koro,
geamikoj
lerte verku
per la fervoro.**

**Verkemuloj
Kontribuu
en kunlaboro
Per la verkoj
Multe stilaj
prezentu ĥoron.**

Cindy Mckee (Usono)

Stranga Besto

**La ĉevalo
staras sola
eĉ kvazaŭ paŭte.
Ĉiogravaj
homaj mastroj
veturas aŭte**

**Stranga besto-
artmetalo
ĝin kovras haŭte.
Skatolforma
uzurpanto
henas tro laŭte**

Shengshengman

(Lanta Sontreniô)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10 versoj
respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36,46,634,37 silaboj,
laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xa (x =
senrima)

Lily

Venena “Mi Vin Amas”

**ja venena
“mi vin amas”
iam esperplena
mi dorskuŝis sub vi
por envena
via kaco dura
vi forte
sen ajn ĝena
piŝtado
diboĉis
per injekto ĉena**

**sed per tromp’ azena
vi lasis
min triste ĉagrena
vi neniam**

**aperas je pena
peto mia, ho ve!
mi kun la
sento svena
ploradas
de nokt' ĝis hor' matena**

附：中文译文
有毒的“我爱你”

充满希望，充满毒药，听一声“我爱你”。
躺在情郎身下，意乱情迷。
只待坚挺玉杵，进来也，所向披靡。
射连串，注玉液，无限春光旖旎。

却是一场骗局。
薄情郎，转身把我抛弃。
人间蒸发，从此不见踪迹。
一任千呼万唤，他却是，再无消息。
心碎也，枉自终日哭泣。

--- ĉinigiis Guozhu 2009-06-18

Shiliuziling

(Dekses-Silabo)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj,
laŭ rimarangô a,a,xa (x=senrima)

Ardo

Kelkaj Provoj pri Rimado

Vi
Tuj foriris sen menci’,
Nun restas
Nur funebra kri’

Vi,
majstro de esperanti’,
la perlojn
verkis kun pasi’.

Kor’
Semas senton pro ador’
Ne ploru,
Vero en furor’

Vent’
volvas amon en lament’,
kial vi

foris en moment'

Sent'

bolas kore kun turment',

ni ambaũ

nestas en amsent'.

Cindy Mckee (Usono)

What I Saw at the Lake

**--in the tradition of Ci, form Shiliuziling
(Sixteen Syllable)**

Lake

lapping waves leave in their wake

detritus

damaged bits that break

Stone

smooth aged, standing all alone

stoical

waterworn to bone

Tree

towers to eternity

nourishment

draws in from debris

Crow
comes from clouds, for tree does grow
sustenance
gained from ground below

附世界语译文:

Kion Mi Vidis Ĉe la Lago

Lag'
ondŝvelas cele al drag'
Ŝtoneroj
pro tiu ŝtelag'

Ŝton'
staras sola, skrapĉifon'
Stoika
ŝlifita ĝis on'

Arb'
alta turo, ĉielgarb'
Nutraĵon
ĉerpas per rubvarb'

Pig'
plonĝas teren pro prodig'
Abundo
de grundo al tig'

Cindy kaj Vejdo

Tempesto

Vejdo:

vent'
balais de okcident'
suspiras
floroj en lament'

Cindy:

mond'
ni luktas kun ekde fond'
tempesto—
triumfa respond'

Vejdo:

ter'
skuas sub tempest-veter'
ni luktas
jen kun sinofer'

Cindy:

rit'
ofera pro ter-agit'
por graco
de tempest-spirit'

Hannes Van Loggerenberg

(Nederlando)

Somera Sapiro

ĉu
centoj da floroj ne plu
ĉeestas
al nia pensflu'?

nun
ĉielan pacon nur kun
la luno
venigus la sun'

Sero

Tri Poemetoj

(1)

Plaŭd'!
ensaltas lagon, kun laŭt'
enakva,
ran' de verda haŭt'

(2)

ran'

**ensaltas jen kun elan'
silentan
lagon por sinban'**

(3)

**lag'
muta en lunluma svag'
englutas
ranon kun salt-ag'**

Vejdo

Gaja Roj'

**roj'
sinue fluas kun ĝoj'
saltete
flustre de hoboĵ'**

Sibla Vent'

**vent'
sible blovas kun lament'
en pinojn
jen de okcident'**

Viktoro

Larmoj de Floro

**Flor’
lamentas per sanga plor’
mizere
pro tiga dolor’**

**Larm’
ŝia fluetas en svarm’
sur teron
de akva malvarm’**

**Fi
ŝin fuŝantoj kun malpi’
deŝiras
de verda foli’**

Yanke

Juna Oldulo

**li
solece en sunradi’
langvore
sidas sen pasi’**

nur

**aŭdiĝas grumbla murmur’
el la buŝ’
en venta susur’**

**pri
vivo intereson li
jam perdas
nur kun apati’**

**am’
por li estas nulo jam
pli malpli
balasta ornam’**

**jun’
jam forlasis de li kun
korvarmo
restas nur trist-pun’**

Shuidiaogetou

(Preludo de Akva Melodio)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj
respektive de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55 silaboj laŭ
rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa / xxa, xa, xxa, xa (x =
senrima)

Vejdo

Omaĝe al Mia Patrino

okaze de 90-jariĝo de mia patrino

jam de knabeco
sub via favor'
mi kreskadas sane
en stud' kaj labor'
neniam forgesas
mi pri via amo
kun varmplena kor'
ĉe ĉiu loko
kaj necesa hor'

via am'
enorma
sen rankor'
enfiltriĝis

**mian korpon de stupor'
mi tuj kuraĝiĝas
je plena energi'
el stagna langvor'
via amzorgo
ververa trezor'**

Shuilongyin (Akva Drako)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 12 versoj de
67,444,444,5433 / 6,34,444,444,544 silaboj, laŭ
rimaranĝo xa,xxa,xxa,xxxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x=
senrima)

Eto

Soifa je Pura Akvo

**akv' abundas monde
torente fluas river'
multaj pluvoj
dise falas
el la aer'
font' kaj rojo
gluglas dolĉe
per flu-ofer'
la maro ondas
puŝe frapas
la bordon
de l' ĉefter'**

**ĉu akvo en prosper'
sufiĉas?
sed en sufer'
oni volas
akvon puran**

**jen kun prefer’
poluita
venenita
de malesper’
akvo nin ĵetas
en kavernon
de la infer’**

Siyuanren

(Sopiro al Fora Homo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvin versoj de 75,
445 / 7,5,545 silaboj respektive, laŭ rimarangô xa,xxa / a,
a, xxa (x=senrima).

Cindy Mckee (Usono)

Poezio Forvagis

(kromnomo: stulta poemo)

**Sidas mi proksime, for
pensojn mi levas
ekster korpo
ili vagas
kien mi revas**

**Riproĉojn mi ricevas
denove devas
reveni domen
survizaĝe
rideto kreas**

Sero

Amik' en Foro

kie troviĝas mia

**amiko en for’?
de dek jaroj
ĝis nun tenas
vin mi en memor’**

**paseo restas en kor’
renkontiĝa hor’
freŝas en menso
aĥ, vi kara
maljuna sinjor’**

Sumuzhe

(Virina Ĉapo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 7 versoj de 33, 45,
7,45 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a,xa (x= senrima)

Sam

Pejzaĝo sur Stepo

**blanka nub'
leĝere
min alglitas
fale surtere
ĉu svagas neĝo vere?
jen ŝafar' sin
paŝtas libere**

**blua mar'
fiere
skvame ondas
ja sendanĝere
ĉu kuŝas akv' vastsfere?
jen la stepo
movas prospere**

Suzhongqing (Kora Sento)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj
respektive de 7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimarangô
a,a,xa / xa,a,xxa (x=senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Vjolo

**ofero de konsolo-
purkora rolo
Personoj kiel vi,
kun bona volo**

**estas ja
la vjolo
dum solo
en koncerto-
rara tono
en izolo**

Adstring'

**kruela vintra ating'
per kirlventa sving'
de karno kaj koro
ĝis esperesting'**

**jen tranĉo!
frida kling'
aĉ-adstring'
kuntiros min
al frumorto
nun sendisting'**

Eto

En Songô

**vi verŝajnas papili'
disflugas sen sci'
al kia celloko—
alie aŭ ĉi**

**mi volas
kun pasi'
jen por vi
preĝi pie
ke vi sane
reen al mi**

Tasuoxing (Paŝo sur Herbo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de
44,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa,a,xa (x=senrima)

Niuniu

Funebre pri Michael Jackson

**jam forfalis
brila stelo
en spaca nigra gelo
kun impona kantvoĉo
kaj hiphopa fabelo**

**liaj bukloj
en ventpelo
flirtas jen en malhelo
de profundo sinkante
kun rapida akcelo**

Tianxianzi (Fea Kanto)

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 7,7,7,3,7 silaboj,
laŭ rimarangô a,a,xa,a,a (x=senrima)

Yanke

Falanta Petalo

venta blova spiralo
puŝpelas al fatalo
florojn tristajn en frido
petalo
en falo
plendas pri frosta alo

Fea Kanto

alflosas el la ĉiel'
melodio kun sonbel'
jen delikate plaĉa
al orel'
en ventpel'
ĉu okazas en fabel'?

Tiaoxiaoling (Flirta Kanto)

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

Veĵdo

Obama Prezidantiĝas

Hura! Hura!
Ovacio kura
Grandioza plano
Pacema avano
Nova, Nova
Potenculo pova

Al Ardo, Mia Amiko

Ardo, Ardo
La ĉineka bardo
Kiel vent' favora
Herbo bonodora
Ardo, Ardo

Plaça al rigardo

Bondeziroj ĉe Novjaro

Novjar', novjar'

Ĝojo ondas en mar'

Dezirojn omaĝu

Benojn ne domaĝu

Ĝua, ĝua

en delico plua

Suneklipso

luno

luno

alnaĝas al suno

ĝin ŝirmas konkere

mallumigas vere

reve

reve

sun' tuj brilas kreve

Zhuang Qixiong

Gratulon

Gratul', gratul',
kun feliĉa regul'.
Per tutkora amo,
por glora deklamo.
Mola, mola
Vi,ĉiam ne sola!

Sciu

Scias? scias,
kial ŝi gracilas?
Sonĝa rememoro,
amsopira koro.
Roko, roko,
vivoplena voko!

Nova Bovjaro

Voje, voje
ĉiuj huras ĝoje.
Feliĉas en koro;
riĉas por valoro.
Rolo, rolo,
kun penema volo?

Printempa Festo

**Festo, Festo,
ĉirkaŭ varma nesto.
En tosta ripeto,
kun bunta raketo.
Toke, toke,
ĉiam pacu moke!**

Lunlume

**Moda, moda
fraz' sub lun' klopoda.
Kant' franda, vin' bona,
recitad' belsona.
Nazo, nazo,
plej juna okazo!**

Wanghaichao

(Rigardo al Martajdo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 446,
446,5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj, laŭ rimaranĝo
xxa, xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x = senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Al Jakvo

(al mia kunbatalanto, kiu estimas la ĉineskon)

**Griza knabo
revante en
via Antverpeno
Elpaŝas vi
interŝanĝas
revojn por agpeno
en mondareno
Nehaltigebla
fenomeno
malgraŭ batoj
kaj malica veneno**

**Flandra indiĝeno
inda flamulo
SAT-gangreno
vi batalas**

**ĝin bruligas
ĝis nulaparteno
ĉe virtkunveno
Proletfleg-penso
daŭra treno
tra kapo kaj
fajro en abdomeno**

Vejdo

Ĉe la Maro

**sola sidas
mi somere
sur kvieta plaĝo
fiksrigardas
al la maro:
ŝipoj en vojaĝo
homoj en naĝo
mevoj disflugas
kun mesaĝo
al ondaro
kia blua pejzaĝo!**

**ondoj per masaĝo
frapas la bordon
sen sovaĝo
delikate**

**egalritme
sur mia vizaĝo
venta adaĝo
sentiĝas flirte
ekkuraĝo
ene puŝas
min al blua miraĝo**

Xiangjianhuan

(Ĝojo de Intervidiĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun tri kaj kvar versoj respektive de 6,3,9 / 3,3; 3,9 silaboj laŭ rimarangô
aaa / bb,aa

Zhuang Qixiong

Kuniĝo

**Drinkas kiel funel’
Sub ĉiel’
ni,flamas pro patriota cel’.**

**Por sorto
kaj forto
de model’
mi skribas poemojn kun fidel’.**

Xiaochongshan

(Malgranda Montvico)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7,
53,7,35 /5,53,7,35 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,a,xa
(x=senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Neeviteble

**Ananka forto fluas
nin trenas pluen
sinuas
tra tago ĝis malfruas
Mallumo
kaj ni genuas**

**Ĥrono fluktuas
neniam. Date
detruas
Falĉile kontinuas
kondamno—
ni rendevuas**

Sero

Pluva Sezono

**venas pluva sezono
kun sibla vento
bontono
batanta sur balkono
muzikas
kun fanfarono**

**super gazono
flirtas silkstrioj
arbkrono
prospere en fruktdono
baniĝas
en guta drono**

Xijiangyue

(Luno super Okcidenta

Rivero)

ĉina fikforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 6,6,7,6
silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

Sero

Kverado en Lunlumo

**kveras paro juna
en zefira susur'
sub la lunluma ebur'
sur noktnigra velur'**

**dolĉa interparol'
jam fariĝas murmur'
por fidela ama pur'
ilin alligas ĵur'**

Yanermei (Ĉarma Okulumo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj de 5 versoj de 7,5,
444 / 75,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa / xa,xxa
(x=sentrima)

Eto

Ŝia Rigardo

**ŝia ĉarma rigardo
de fajra ardo
mi renkontis
ĝin surstrate
je hazardo**

**mi certas pri ĝia mank'
en verka arto
de l' poeto
nek en kantad'
de la bardo**

Yexingchuan

(Nokta Ŝipvojaĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de
7,34,446 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xxa (x = senrima)

sam

Eknoktiĝo

**sub bunta lum' neona
eksvarmas
la brusona
homa fluo
miksita kun
vokoj telefonaj**

**diverŝiĝas impona
lamplumo
kolordona
el domegoj
multfenestraj
kun griznigro fona**

Yijianmei

(Branço da Umefloro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de
7,44,744 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xxa (x = senrima)

Eto

Hieraŭ

**hieraŭ ŝi plezure
min amuzis
perhumure
sed nun ŝi turnas al mi
sian dorson
kraĉsusure**

**hieraŭ ŝi murmure
amdeklaris
jen perĵure
sed nune ŝi sekrete
forvojaĝis
jam senspure**

Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)

ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj
laŭ rimarangô xa,xa,a (x=senrima).

Cindy Mckee (Usono)

Sentitole

**printempa
vivkrio pasas
tra la mondo mortlaca
Neĝo ĝin lasas
floroj amasas**

Sero

Persikfloroj en Marto

**ruĝetaj
floroj en sunlum'
svingas leĝere fole
en primavera brakum'
ah, kun florparfum'**

Printempa Gloro

**en vintra
frosta rigoro**

**alvenas leĝerpaŝe
printempa gloro
jen de malforo**

Vejdo

Al Cindy Mckee

**vi kara
en uesta for'
kun ĝojo plukas kordojn
de antikva ĉina vjol'
kun rava fervor'**

**disflugas
bela melodi'
adaĝa aŭ alegra
kun notoj de emoci'
kaj kun senta pi'**

**vi kara
en lontana lok'
sendas jen amikecon
de granite dura rok'
dum reta epok'**

Yanke

Korpordo

lastnokte
mi frapis je pord'
ĝi firme kontraŭstaris
la mastrino kun lipmord'
silentis sen akord'

mi ree
frapas matene
je pordo foj-refoje
ĝi rifuzas azene
per forto pene

morgaŭe
mi kun memfido
kredas, ke l' pordo cede
ovriĝos sen insido
kun ŝia rido

Yiqin'e (Memoro pri Palaca

Knabino)

ĉina fiksforma poemo de du strofoj po 5 versoj de
3,7,3*44 / 7,7,3*,44 silaboj, laŭ rimarangô aaA,xa /
aaA,xa (x=senrima)

Zhuang Qixiong

Komercistino

**Prema kor'
batadas pro tempa or'.
Tempa or'
utilas al
viva aŭror'.**

**Kun venta kaj pluva glor'
ŝi negocas per favor'.
Per favor'
ĉiam restu
bona memor'!**

Yongyuyue (Ĉiama Ĝojo de Renkontiĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 12 versoj de
444,445,446,346/ 446,445,446,344 silaboj, laŭ
rimaranĝo xxa, xxa, xxa, xxa (x=senrima)

Guozhu

Plena Sun-eklipo

**Por publiko/ surpriziĝo/ sensacio,
en du-mil naŭ/ festeno de/ astronomio.
Sun-eklipo/ plena kaj en/ larĝa dimensio
okazas/ du-dek duan/ ĉe ni en julio.**

**Televideo/ disvidigas/ rekte el Ĉinio.
Imponas la/ fenomeno/ kvazaŭ magio.
Ses minutoj/ da noktiĝa/ tagiĝa vario.
Eterne/ memorinda/ emocio**

Yugezi (Fiŝista Kanto)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 7,7,33,7, silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a (x=senrima)

Sero

Lamento de Birdo

**Birdo triste lamentas,
“Kio jen al mi restas
ankoraŭ?
Infestas
domoj, kie mi nestas?”**

Yulinling (Tintado en Pluvo)

Ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35,634,426,345 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Ĉu kapuĉini aŭ ne kapuĉini?

**Kafeini
ĝis komenci
halucini
Tio estas ĝojo
Mian menson
ilumini
mia celo estas
jam ne min klini
al la lit'
Nur lumadi
mian tagon ne fini**

**Mi bezonas urini,
doloron
povas difini
Eĉ artikaj ligoj
ĝemas dum
determini**

ĝustan lokon
Ĵuras
jam ne kapuĉini
akre mi
dum ekstremaj
paŝoj abstini

After the Migraine

(exercise in Yulinling, after my migraine)
--in the tradition of Ci, form Yulinling

Maybe in vain
but still I try
Same old refrain-
you know the old saying
it's true, I guess:
no pain, no gain.
I pick myself back up
after the migraine
once again
charge at those chores
and try hard not to complain

Shower is a soothing rain
disappears
pain down that dregdrain-
into memory fades.
Yes I can

**always sustain.
Self-compassion,
pity
guests I don't entertain
with head clear
it's time to see
what I can attain**

Vejdo

En Pluveto

**en pluveto
svagas nube
silueto
de fraŭlino povra
murmure kun
preĝ-ripeto
ŝi ŝajne deziras
jen kun diskreto
malfermi
la kor-pordon
kie sidas sekreto**

**ŝi pala kiel kreto
tremetis
en pluva reto
subite eklevas
la kapon**

**kun har-ĵeto
ŝi rapidas
haste
kun paŝa impeto
decide
ne hezitas
pri eldir-preto**

Yumeiren (Belulino Yu)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj
de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.

Eto

Retamikino

**trarete parolas ŝi
sincere al mi
per dolĉa milda vortflu'
tuŝas mian koron kun tremsku'**

**mi sendormas ĉagrene
ĉiam sinĝene
kial ŝi sorĉas min jam
torturas min per ankora flam'**

Zhegutian (Pedrika Ĉielo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj
respektive de 7,7,77 / 33,7,77 silaboj, laŭ rimarangô
a,a,xa / xa,a,xa (x=senrima)

Yanke

Cikado

**somere ĉirpas cikad’
sur la arbtrunko ĉe pad’
senĉese kaj senlace
per akutvoĉa invad’**

**ve al vi—
flug-nomad’
buboj vin kaptas pro ŝat’
per glustang’ kaj reto kaj
ludas kun vi sen kompat’**

Zuihuajian

(Ebrio inter Floroj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 4 versoj
respektive de 3,3,5,55 / 5,5,55 silaboj, laŭ rimarangô
a,a,a,xa / a,a,xa (x=senrima)

Eto

Flora Aromo

junie
magie
aromo ĉie
lasas min ĝui
tute ebrie

mi fantazie
kaj tre pasie
sopiras al ŝi
ameme plie